

La rasismo

Claude Gacond, 89-a radioprelego, 1964.08.12 & 15

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio pri la rasismo. Vi aŭdas Claude Gacond.

Dum la pasinta monato en Usono nova leĝo, kiu koncernas la ĉesigon de la rasapartigo, estis fine adoptita, post longaj debatoj en la du ĉambroj de la federala parlamentejo kaj subskribita de prezidanto Johnson. Tiu leĝo pri la civitanaj rajtoj forte apogas la nigrulojn en ties kampanjo por la akirado de egaleco kun la blankuloj.

Sed la plej bela leĝo ne povos multon fari por la subpremataj nigruloj, se ili mem ne daŭrigas la lukton por la akirado de siaj rajtoj. Tion bone komprenis reverendo Martin Luther King junulo, la usona disĉiplo de Mahatmo Gandhi, kiu per neperfortaj kampanjoj provas konduki siajn samrasanojn, ne nur al la venko super la rasapartigo, sed ĉefe al la venko super la malamo kontraŭ la blankuloj. Tiu fakto estas tiom grava, ke ĝi valoras atentan ekzamenon, ĉefe kiam la novaĵanoncoj nur raportas pri perfortaj konfliktoj inter ekscititaj nigruloj, policianoj kaj rasapartigemuloj.

Dum kelkaj elsendoj mi prezentos al vi la kuraĝan laboron de Martin Luther King. Ĉar sathagraho, tio estas neperforto, aŭ pli bone la forto de la vero, estas la etiko de tiu homgvidanto, mi tradukas por vi la finon de prelego, kiun la nigra reverendo faris en Kolegio de la urbo Iowa en 1962. En tiu teksto Martin Luther King difinas, kio estas por li neperforto.

Post detala priskribo de la rasapartiga situacio en 1962, de la sukcesoj de la kampanjoj por la ĉesigo de tiu rasapartigo, de la problemoj, kies solviĝo necesigos longan tempon, Martin Luther King diras :

« Necesas, ke la nigrulo adoptu konsekvencan kaj decidan pozicion por spiti la kondiĉojn, kiuj lin ĉirkaŭas kaj kiujn li trasuferas. Li ne povas resti simpla observanto, kiu atendas, ke aliaj homoj stariĝu por defendi liajn rajtojn. Tre ofte mi ripetis, ke la libereco ne estas manĝaĵo, kiun la federala registaro aŭ la blankulo surtabligos prodigece sur arĝenta plado dum la nigrulo kontentiĝos alporti sian manĝemon. Se la rasintegrado devas fariĝi realeco, la nigrulo devas batali, oferadi kaj suferi por ĝi. La nigrulo devas laboradi pere de la leĝofarado ; li devas laboradi por duobligi la nombron de la enskribitaj elektantoj celante la transformiĝon de la politika klimato ; li devas laboradi pere de la tribunaloj por obtieni, ke la leĝo fariĝu klara kaj la Konstitucio preciza koncerne la demandon de la rasapartigo. »

Parenteze ni povas diri, ke la adopto de la nova leĝo pri la civitanaj rajtoj estas jam granda sukceso de la laborado de la nigruloj. Tiu leĝo klare kaj precize difinas la pozicion de la federala registaro. Kaj antaŭ ol ĝin subskribi prezidanto Johnson nete montris sian volon prononcante vortojn, kiuj certe eniros la usonajn historiajn librojn. Jen citaĵo de liaj paroloj : *« Ni kredas, ke ĉiuj homoj havas rajton al la bonfaro de la libereco, kaj tamen milionoj da ili ĝin ne konas, ne pro sia kulpo, sed pro la koloro de sia haŭto. Ni komprenas sen rankoro kaj sen malamo la kialon de tiu okazaĵo. Sed tiu fakto ne povas daŭri. Nia Konstitucio tion ne permesas. La moralo tion ne permesas. Kaj la leĝo, kiun mi tuj subskribos, tion ne permesas. »*

Antaŭ ol reveni al la asertoj de Martin Luther King, ni ĵetos rigardon al la decidoj de tiu nova usona leĝo. Jen resume kion ni trovas en ĝi :

Proklamo, ke la kutimoj, kiuj permesis forstreki la nigrulojn en la elektaj listoj, estas nelegaj. Malpermeso de la rasapartigo en la hoteloj, moteloj, restoracioj, distraĵejoj kaj ĉiuj publikaj lokoj : parkoj, sportejoj, naĝejoj, marbordo. Ĉiuj publikaj lernejoj devas ĉesigi la rasapartigon, same kiel la fabrikoj kaj sindikatoj. La federala registaro pere de justeca federala kortumo kaj de la komisiono por la civitanaj rajtoj kaj la ebleco ĉesigi siajn subvenciojn, kiam programoj daŭrigas subteni rasapartigon, povos pli forte interveni, kiam la nigraj usonaj

La rasismo

Claude Gacond, 89-a radioprelego, 1964.08.12 & 15

civitanoj estos konsiderataj kiel sklavoj. Speciala tribunalo estos fondita por solvi la rasajn konfliktojn kaj la ministro pri justeco rajtos deklari balotojn nelegajn, kiam la nombro de nigraj elektantoj ne korespondoj al la statistikoj.

Tiu leĝo do signifas grandan paŝon antaŭen por forigi la rasapartigajn kutimojn. Sed ni ne forgesu, ke tiuj kutimoj ne similas al mortanta folkloro, ili daŭre vivos, kaj eĉ plifortiĝos, en la menso de milionoj da blankuloj kaj ankaŭ nigruloj. La geaŭdantoj, kiuj aŭdis komence de tiu ĉi jaro mian raporton pri la libro de la kuraĝa John Howard Griffin, *En la haŭto de nigrulo*, komprenis kiel profunde enradikiĝis en la cerboj la rasapartigaj kutimoj. Martin Luther King en sia parolado montras, ke estas pro tio, ke liaj rasanoj devas batali neperforte kaj senĉese. Ni redonu al li la parolon :

« La nigrulo devas kompreni, ke tribunala juĝo nur kapablas pruvi rajtojn, sed neniam kapablos ilin efektiviĝi. Nur kiam la homoj mem ekagas, la surpaperaj rajtoj ekvivas. Tial, al ĉio entreprenita per la leĝofaraj, elektorajtigantaj kaj juĝaj vojoj, la nigrulo devas aldoni la neperfortan agadon. »

Venontan semajnon mi tradukos, kion Martin Luther King diras pri tiu neperforto.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la rasismo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-